

VI DIRAS, KE MI ESTAS REĜO

Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

(Joh 18, 33,38)

[En tiu tempo] Pilato diris al Jesuo: ”Ĉu vi estas la Reĝo de la Judoj? Jesuo respondis: Ĉu vi tion diras de vi mem, aŭ ĉu aliaj diris ĝin al vi pri mi?

Pilato respondis: Ĉu mi estas Judo? Via propra nacio kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi; kion vi faris? Jesuo respondis: Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo; se mia regno estus el ĉi tiu mondo, miaj servantoj bataladus, por ke mi ne transdoniĝu al la Judoj; sed nun mia regno ne estas el ĉi tie.

Pilato demandis lin: Ĉu vi do estas reĝo? Jesuo respondis: Vi diras, ke mi estas reĝo. Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon, ke mi atestu pri la vero. Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultas mian voĉon.”

En la evangeliere kiun ni nun pritraktas estas prezentita la unua pridemandado fare de la romia prokuroro, Pilato, al Jesuo. Ni legas.

Pilato do reeniris en la palacon, kaj alvokis Jesuon, kaj diris al li: “Ĉu vi estas la Reĝo de la Judoj?”. Tiu estas la akuzo kiun la ĉefsacerdotoj faris al Jesuo, nome ke li estas la Mesio, la Kristo. La homo sendita de Dio kun la povo de Dio, kiu estus devinta renversi la ekzistantan povon kaj elpeli la romianojn. Do, tiu estas la akuzo kiun la ĉefsacerdotoj prezentis kontraŭ Jesuo por komdamnigi Lin de Pilato.

Kaj Jesuo respondis al li : ”Ĉu vi tion diras de vi mem, aŭ ĉu aliaj diris ĝin al vi pri mi? “Jesuo ne respondas al demando kiun Pilato faris al Li, sed Li petas al Pilato rezoni per lia kapo, kiel Li jam faris kun la gardisto kiu estis Lin vangofrapinta.: ”Se mi eraris, montru al mi kie mi eraris, sed se mi ne eraris kion celas tiu vangofrapo?”

Do, Jesuo invitas Pilaton rezoni per lia kapo, “Ĉu vi tion diras de vi mem, aŭ ĉu aliaj diris ĝin al vi pri mi?”

Kaj Pilato reagis per indigno kaj malŝato. “Ĉu mi estas Judo?” kaj li tiamaniere esprimas la tutan naŭzon kiun Pilato sentis al tiu popolo, kaj kion Pilato diras estas terura: ”Via propra nacio kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi”. Ĉiuj sin turnis kontraŭ Jesuo. Sankta Johano tion jam diris en sia Prologo (1,11), “Li venis al siaj propraĵoj, kaj liaj propruloj lin ne akceptis”.

Oni povas kompreni ke Jesuo estis transdonita al Pilato de la ĉefsacerdotoj, sed eĉ la nacio transdonis Lin al Pilato – ĉar temas pri la venko de la povo – kaj tiuj kiuj havas povon kaj ankaŭ la subigitaj homoj vidas en Jesuo kvazaŭ atencon al ilia sekureco mem, al sekureco kiun donas la povo. Do, “Via propra nacio kaj la ĉefpastroj transdonis vin al mi; kion vi faris?”

Por la ĉefsacerdotoj kaj por la homamaso Jesuo estas pli danĝera ol la regantaj paganoj, la romianoj. Ili transdonas la liberiganton al la regantoj ĉar Jesuo estas danĝerega. “Jesuo respondis: “Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo”.

Atentu! Jesuo ne estas diranta ke Sia Regno ne estas En tiu ĉi mondo, sed Li diras ke ĝi ne estas el tiu ĉi mondo, nome, ĝi ne troviĝas inter la konataj regnoj. La regnoj baziĝas sur perforto, sur teruro, sur violento kaj timo.

La Regno de Jesuo, ĉar temas pri Regno, la Regno de Dio, baziĝas sur nenio el ĉi tio. Kaj Jesuo diras: ”Se mia regno estus el ĉi tiu mondo, miaj servantoj bataladus”. Jesuo ne estas diranta ke Li havas servistojn, sed Li kiu estas Dio fariĝas. Tiel ke li ne havas servistojn ĉar Li mem, la Sinjoro fariĝas servisto por la aliaj. Jesuo volas komprenigi al ni ke Sia Regno estas tute malsama el la regnoj el tiu ĉi mondo, en ĝi la reĝo ne havas servistojn sed estas la reĝo kiu fariĝas servisto.

La Sinjoro fariĝas servisto por ke tiuj kiujn oni konsideris servistojn sin konsideru sinjorojn, “Sed nun mia regno ne estas” – kaj tie troviĝas tradukeraro – ĝi ne estas “el ĉi-sube”, sed “el ĉi tie”, nome ĝi ne apartanas al tiu ĉi politiko. Jesuo ne kontraŭmetas la ĉielon al la tero, sed Li kontraŭmetas du malsimilajn mondojn: tiun de la povo al tiu de la amo, tiun de la dominado al tiu de la servo.

“Tiam Pilato demandis lin: “Ĉu vi do estas reĝo?”. Jesuo respondis:” – kaj tie ĉi la traduko estas malpreciza, la traduko de CEI (ITALA EPISKOPARA KONFERENCO) tradukas: ”Vi tion diras, mi estas reĝo, kiel se Jesuo konfirmis ke Li estas reĝo. Ne, la greka teksto estas: ”Vi diras ke mi estas reĝo”, nome, tiu estas via opinio. Sed Jesuo tranĉas la paroladon. Jesuo ne interesiĝas pri la parolado je reĝeco, sed Li interesiĝas pri alia parolado. Do Jesuo tranĉas la paroladon kaj Li diras: ”Vi diras ke mi estas reĝo.”.

“Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon: ke mi atestu pri la vero”, jen la temo kiu interesas al Jesuo, ne temas pri tiu de la reĝeco, sed temas pri tiu de la vero. Kio estas la vero? La vero pri Dio. Dio estas amo kiu petas esti akceptita. Ĝi estas la vero pri la homo kiu, akceptinte tiun amon, akiras la dian kondiĉon.

Kaj Jesuo aldonas: ”Ĉiu, kiu estas el la vero”, Li ne diras: ”Ĉiu kiu havas la veron”. Jesuo diras: ”Mi estas la vero”, li ne diras: ”Mi havas la veron”. Kiu havas iun veron, nome, iun doktrinon, tiu ekskludas ĉiujn kiuj ne konsentas kun li. Kiam oni opinias havi la veron oni kapablas juĝi ĉiujn la aliajn. Jesuo ne diras ke Li havas la veron, sed ke Li estas el la vero. Se la vero estas la amo de Dio al la homaro, esti el la vero signifas akordigi kun tiu amo de Dio por la homaro, fari el la bono de la homaro la pasion de la tuta propra vivo.

“Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultas mian voĉon.” Ni estus atendindaj la malon: ”kiu aŭskultas mian voĉon sin metas en la vero”. Ne, kiu estas el la vero, nome, por aŭskulti, por kompreni, por bone kompreni la mesaĝon de Jesuo oni devas havi en sian koron senfinan, senliman pasion por la homaro. Nur tiuj kiuj havas kiel celon de sia propra ekzisto la bonon de la homaro, nur tiuj povas vere kompreni la vortojn de Jesuo.

Do, ”Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultas mian voĉon”. Nu, kiel Jesuo ne interesiĝis pri la temo de la reĝeco, Pilato, la reprezentanto de la povo, certe ne interesiĝas pri la temo de la vero kaj li tranĉas la paroladon dirante: ”Kio estas vero?”, ne “la vero”. Al li ne interesas tion, ĉar la povo baziĝas sur la mensogo kaj sur la trompo.

